



Oktabro

2024

Esperanto-Informilo



Bildo de G. Hennemann: "Rigardo al la urbocentro de Roterdamo fotita de la Erasmus-ponto la 18-an de septembro 2024"

Mesaĝo de la prezidanto:

La septembro nun finiĝas kaj rekompencis nin kun belega milda vetero. Mi ĝuis sunan semajnon en Nederlando, kie mi luis velŝipon en la pitoreska havenurbeto Willemstad apud la Rejnodelto. Unu tagon mi vizitis Roterdamon kaj kompreneble ankaŭ la UEA oficejon en la *Nieuwe Binnenweg 176*. La lastan tagon mi restis en Antverpeno en Belgio, urbo, kiu sorĉumas pro sia malnova urbocentro apud la Schelde-rivero kaj kun amaso da turistaj atrakcioj kiel la arkitekture impona MAS-muzeo **Museum aan de Stroom** (deutsch: „Museum am Fluss“).

Amuzan legadon,
G. Hennemann, 1-an de oktobro 2024

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Rakonto
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Kolofono:

Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

**Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main e.V.**
www.esperanto-frankfurt.de
1. Vorsitzender:
Georg Hennemann
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung / bankkonto:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag / jarkotizo:

ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Unua mardo

La 1-an de oktobro 2024

ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zumo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 15. Oktober, 2024

Mardon, la 15-an de oktobro, 2024

18:30 h
Sprachrunde

18:30 h
Lingvo Rondo

G. Hennemann

-

-

19:30 h
Vortrag "Zungenbrecher"

19:30 h
"Langorompiloj."

U. Fellmann

Kvara mardo

La 22-an de oktobro, 2024

ekde la 19-a horo: Senprograma samideana babila renkontiĝo

Stattcafé, Grepstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Bildfonto kapaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745>,

[https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape Frankfurt 2021 Panorama.jpg](https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg)

El la klubo

Anoncoj:

- 01.10.24 19:00 Babila Rondo
- 15.10.24 12:00 Regula Klubvespero
- 21.10 – 30.10 **Kurso *Aŭtunas* en Esperanto-Kulturdomo Grésillon-Greziljono:**
Nia klubmembro Frank Lappe ĉi-tieos por paroligante komencantojn kaj aldone proponas praktikan kurson pri unua helpo (sukurismo) en Eo.

R'damo kaj Bazelo: Du urboj konektita de Erasmo kaj rivero

Opinia eseo de G. Hennemann

Ĉu vi iam estis en Roterdamo aŭ pli mallongita Rodamo? Mi estis tie unuafoje tiun septembron kaj bedaŭrinde nur unu tagon. Estas ege moderna metropolo kaj tute aliaspektas ol aliaj beneluksaj havenurboj kiel ekzemple Amsterdamo aŭ la belega belga urbo Antverpeno. Kompare kun ili R'damo aspektas multe pli vasta kun siaj grandaj riverobranĉoj, kiuj estas superkonstruitaj per grandiozaj pontoj. La plej granda estas la Erasmo-ponto (nederlande: *Erasmusbrug*) kiu konektas la urbocentron kun la suda parto de Roterdamo *Kop van Zuid* (germane: *Kopf von Süd*), urboparto, kiu antaŭnelonge estis ruiniĝinta, sed nun faris gravan salton antaŭen kun novaj konstruaĵoj, nubskrapulaj oficejoj kaj hoteloj. La haveno etendiĝas el la urbocentro de Roterdamo tridek kilometrojn ĝis Hoek van Holland (germane: Ecke von Holland) je la marbordo, kiu ankoraŭ estas distrikto de Roterdamo, sed konservis sian karakteron de malgranda marborda urbo kaj ĉemara feriejo.

Ke Roterdamo tiom aliaspektas kompreneble ankaŭ estas kulpo de la germana bombado, kiu detruis la tutan malnovan urbon dum la agresiva invado inter la 13-an ĝis 15-an de majo 1940. La transdono-intertraktadoj kiuj estis iniciatitaj fare de la defendantoj atingis la germanajn komandcentrojn tro malfrue la 14-an de majo. Nur la dua eskadro de la proksimiĝanta „Kampfgeschwader 54“ povus esti ordonita reen per kontraŭ-ordo. Entute 57 bombistoj de la unua eskadro alproksimiĝanta al Roterdamo faris la atakon. Pli ol 90 tunoj da bomboj preskaŭ tute detruis la malnovan urbon, kie pli ol 800 civiluloj mortis. Proksimume 25,000 domoj forbrulis kaj 78,000 homoj iĝis senhejmaj. Pro la senespera armea situacio kaj por malhelpi plian arebombadon de aliaj gravaj grandurboj, la nederlandaj armetrupoj kapitulacis la 15-an de majo 1940.

Oni ne scias precize en kiu jaro kaj kie naskiĝis Erasmo. La naskiĝloko devis esti en urbo Gouda (prononcita: Gaŭda) aŭ Roterdamo inter la jaroj 1464 kaj 1469. Lia naskiĝtago estas certa: estis la 28-a de oktobro, la festo de la apostoloj Simon kaj Judas. Erasmo, la ekstergeedza filo de katolika pastro kaj lia mastrumisto, frekventis plurajn latinajn lernejojn kaj iĝis kanoniko en aŭgustena monaĥejo, kie li estis ordinita pastro. Post forlasado de la monaĥejo, li akceptis la postenon de sekretario de la Episkopo de Cambrai en norda Francio, studis teologion ĉe la Sorbonne en Parizo sen esti permesita doktoriĝi tie kiel ekstergeedzulo, kaj renkontis Thomas More dum restado en Anglio en la somero de 1499.

De 1506 ĝis 1509 li vivis en Italio kaj doktoriĝis en Torino. Reveninte al Anglio, li instruis en Queens' College, Cambridge de 1510 ĝis 1515. Erasmus pasigis la lastajn jardekojn de sia vivo en Freiburg kaj Bazelo. Li mortis tie la 12-an de julio 1536. Bazelo, kiu fariĝis protestanta, permesis al Erasmo, kiu ja restis „Malnovfidela kredanto“, esti enterigita en la katedralo de la urbo. La Katolika Eklezio ne estis tiel grandanima: en 1559, la Koncilio de Trento metis la verkojn de la aŭtoro al la indekso, kiu kiel neniu alia disvastigis la vorton de Dio registrita en la Evangelioj. La malpermeso estis nuligita nur en 1963. La ekstergeedza filo de pastro estis malpermesita de multaj karieroj kaj dum multaj jaroj li vivtenis sin kiel privata tutoro kaj estis dependa de donacoj de bondisponitaj nobeloj kaj preĝejoj estroj; La elirejo de ĉi tiu situacio estis la papa dispensado de Leono la 10-a en 1511. Erasmus, kiu ne parolis vorton de la angla, iĝis pastro de paroĥo en Kent, sed prirezignis la pastran postenon post nur unu jaro. Li ne strebis al ofico, sed prefere serĉis profiton. Li eĉ rifuzis konstantajn postenojn kiuj venis kun la digno de kardinalo por ne permesi al lia literatura agado esti limigita; Tre frue, Erasmus enkarnigis la tipon de tio, kion la sociologo Karl Mannheim nomis "socie liberŝveba intelektulo".

Roterdamo kaj Bazelo estas interkonektita de la rivero Rejno kaj tiu ofertas interesan komparon: Erasmo sian tutan vivon naĝis kontraŭ la fluo (kvazaŭ de Roterdamo al Bazelo) kaj devis batali kontraŭ la dogmoj de la rom-katolika eklezio; li nur ne faris tion tiom energie kiel Lutero.



Fine la demando restas ĉu Erasmo vere naskiĝis, vivis kaj verkis en Roterdamo? Kaj se oni ne scias tiujn datumojn tutcerte - kial li nun nomiĝas Erasmo de Roterdamo? Eble nur pro tio ke "Erasmo de Gaŭdo" ne sonas tiom bele? Dum vojaĝo tra Anglio ĉirkaŭ la jaro 1500 li renkontis Thomas More, kun kiu li iĝis dumviva amiko. Li dediĉis al li sian verkon *Encomium moriae* (La Laŭdo de Malsaĝeco), publikigita en 1511, en kiu li ironie pledis kontraŭ oftaj eraroj kaj por prudentaj opinioj, nenium ekskludante.

Ligiloj:

- <https://www.welt.de/kultur/literarischewelt/article249885662/Erasmus-von-Rotterdam-Er-sprach-fliegend-Latein-und-galt-als-Fuerst-der-Humanisten.html>
- <https://www.deutschlandfunk.de/erasmus-von-rotterdam-ein-kosmopolitische-vordenker-100.html>
- <https://www.getabstract.com/de/zusammenfassung/das-lob-der-nartheit/6027>

El la klubo historio

Skanaĵo el la klublibro oktobro 1998



Teorio kaj praktiko, aŭ: la eksperimento

Rakonto de Felmano Ulriko

Uwe bakis pomfritojn en potu, kun amaso de likvidigita graso. Ni estas du inĝenierarto-studentoj, mia unua ĉeffako estas energiteĥniko, ni ambaŭ jam sukcese faris la ekzamenon en la fako "materialsacio".

La pomfritoj gustis bone.

Post la manĝo - kion fari rilate la varmega oleo? "Mi konservos ĝin en termosu!" li diras, "kaj ni povos denove uzi ĝin. Mi antaŭe filtras ĝin por depreni la pecojn de la pomfritoj."

Stariganta la botelon, surmetanta la filtrotenuilon, prenanta la filtropaperon, celita por kafa polvo..., enmetanta la paperon en la platan filtrilon...

"Haltu!" mi vokas.

"Kial?"

"La oleo estas tro varmega."

"Kial do? Mi ja zorgas ke mi ne tuŝu ĝin."

"Ne funkcios. Tiu filtrilo estas el plasto, celita por prepari kafon, do, elteni maksimume centgradan bojligitan akvon. Sed tiu oleigita graso bolas nur je inter 200 kaj 250 gradoj. Plastoj por uzo en kuirejoj eltenas 120 gradojn senprobleme, ĉar akvo bolas je 100 gradoj, sed ne multe pli, kaj certe ne 180 gradojn. Ni devas uzi ceramikan filtrujon."

"Ni ne havas ceramikan."

"Ni do atendu minimume horon antaŭ ol uzi la platan."

"Ĉu" li diras. "La oleo certe jam ne plu estas tiom varma, jam malvarmiĝintis".

"Graso havas altan varmkapaciton kaj malaltan varmkondukon."

"Hm." Li hezitas.

"Jes, la oleo aspektas nedanĝere, ĝi ne faras bruon, ĝi ne produktas vezikojn. Sed tio trompas onin, oni estas alkiutimita al la ago de akvo."

Li decidas... li levas la poton, kaj klinas ĝin super la filtrilo sur la termosu. La oleo enfluas... kaj la plasta filtrotenuilo dum sekundo, rapidege, kvazaŭ tuj, faldiĝas al plasta bulo, kaj la varmega oleo fluas super la termosu.

La eksperimento pruvis, kion ni je la universitato fakte lernis. Sed por homoj estas ofte defie apliki en praktikon, kion ili lernis teorie.

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Policisto haltigas ebrulon kaj volas vidi lian stirlicencon.
La aŭtomobilisto estas indignita: - Mi donis ĝin al vi jam antaŭ ses semajnoj. Ĉu vi mislokis ĝin?

Proverbo de la monato (elektita de G. Hennemann)

La proverbo kiun mi hodiaŭ prezentas temas pri malaperoj. Mi komprenas la proverbon tiel:
Se oni skribas aŭ desegnas ion per fingro en la fulgo de la kamentubo ĝi baldaŭ estas kovrita de nova fulgo kaj malaperas.

1782 [zam-976.03] Notu en la kamentubo

Fonto: https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/temo_malapero.htm

Enigmo (sendita de U.Fellmann)

Enigmo pri ZEOj

Vi ja verŝajne scias, kio estas ZEO. Divenu, kiaj objektoj de la sekva listo ne estas nomitaj laŭ Zamenhofo aŭ Esperanto:

Speco de rozo?
Asteroido?
Parko en Vieno?
Vegana vendejo en Tokio?
Tuta urbo, kiu nomas sin oficiale "Esperanto-urbo"?
Stratoj en Frankfurto?
Turo en Bjalistoko?
Kinejo en Krakovo?
Akademio?
Zamenhofa Apoteko en Lodzo?
Liceo je la nomo de Zamenfo?
Ĝarden-nano kun vizaĝo de Zamenhof?
Ŝipo en Hispanujo?

Ekstra demando: en kiu urbo troviĝas la tombo de Kabe?

Solvo de la antaŭa enigmo

La serĉita poeto estis Christian Morgenstern.

Poemo pri ruĝo (de Ulriko, helpe de AI)

(Felmano Ulriko)

Tri ruĝaj knabinoj, en ĝojo ludantaj,
En ĝardeno florplena, sub suno brulantaj.
Silkaj haroj flugantaj en la dolĉa vento,
Ilia rido resonas, je plena kontento.

La unua, kun ornamoj de floraj variantoj,
Dancante en sunlumo, sennombraj ĉarmoj,
Ŝiaj okuloj lumas, kiel steloj en la nokto,
Ŝi kaptas la momenton, en mondo farita por sukceso.

La dua, kun fiero, senlima tristeco,
Oni pensas, ke ŝi portas kaŝitan misteron.
Sed sub la ruĝa tono, sinjorino de lumo,
Ŝi ĝojas en la ludo, dum la danco preskaŭ plumo.

La tria, plena de ŝercemo, kun rido dolĉa,
Ŝiaj paŝoj sur la grenejo, en la tago bela.
Ŝi karesas la tagon, kun spirito lumita,
Prenas la manojn de amikoj, en ĝojo plenumita.

Tri ruĝaj knabinoj, en la ĝardeno floranta,
Amikeco, rido kaj ĝojo, ĉirkaŭ ili svinganta.
Koroj ligitaj per lumo, sub la ĉielo vasta,
Ili estos ĉiam, en la vivo, la esenco balasta.

--